



NAJ mesto a obec
SLOVENSKA 2017

MESTO PRE VŠETKÝCH

LIPTOVSKÝ
MIKULÁŠ



Programlibro SES-2018



Organizantoj



Peter Baláž – Petro (SK)
ĉef-organizanto de la aranĝo



Dorota Rodzianko (PL)
financoj, administrado



Matthieu Desplantes (FR)
retpaĝaro, kinejo, teknikaĵoj



Sofja Zareckaja – Sonja (RU)
administrado, grafikaĵoj, sociaj
retoj, akceptado, surloka helpo



Ekaterina Lozina – Miri (RU)
posttagmeza programo,
grafikaĵoj, akceptado



David Mamsch (GE)
vespera programo, teknikaĵoj,
akceptado



Kryštof Klestil (CZ)
grafikaĵoj, trinkejo



Peter Holba (SK)
libro servo



Edoardo Nannotti (IT)
grafikaĵoj, surloka helpo



Marta Tikhomirov (PL)
anĝeloj, paroligaj rondoj,
surloka helpo



Tomáš Stano (SK)
sporta programo, surloka
helpo



Salomé Hug (FR)
surloka helpo (instruistoj)



Luc Allemand – Luko (CH)
kafopauzoj, surloka helpo



Michal Grodza (SK)
surloka helpo



Eugénia Belková – Žeňa (SK)
akceptado, surloka helpo

Lingvokursoj: Instruistoj

SES-organizantoj estas ĝojaj kaj fieraj povi prezenti al vi la plej grandan internacian instruistan teamon dum la nuntempe plej granda somera Esperanto-lernejo. La instruistoj estas por SES la plej gravaj personoj – ili venas, por ke vi foriru de la aranĝo pli riĉaj je novaj scioj, por ke via Esperanto-nivelo signife kresku dum tiuj ok tagoj. Ni tre petas, obeu ilin, lernu diligente kaj pruvu al ili kaj al vi mem, ke ili ne venis vane :-). Por ke ni povu gastigi ilin ankaŭ dum la venontjara SES!

Nivelo A1



Víctor Solé (Katalunio)

Niveloj A2–B1



**Christophe Chazarein
(Francio)**

**Nina Pietuchowska
(Pollando)**



Nivelo B2



**Tim Morley
(Britio)**

**Arina Osipova
(Rusio)**



Niveloj C1–C2



Konstantin Tikhomirov (Rusio/Pollando)

Aliaj kursoj

Esperanto-literaturo kaj kulturo

Per Esperanto eblas ne nur ami kaj kvereli, kunsidi kaj forgesi akuzativojn, sed ankaŭ verki literaturajn tekstojn. Jam ekde Zamenhof en nia lingvo estiĝis poemoj, romanoj, noveloj kaj tiel plu ĝis kanto-tekstoj rande de beletro. Venu al nia kurso, kaj vi kleriĝos pri literaturo en Esperanto kaj ni montros al vi kiel verki (mal)bonan poemon!

Surbaze de la deziroj kaj de la konsisto de la partoprenantoj, ni traktos diversajn temojn, ekzemple:

- Enkonduko al la t.n. E-kulturo kaj E-literaturo, konkrete al la originalaj poezio kaj prozo kaj al la periodoj de la originala E-literaturo (laŭ Sutton).
- Aparta pritrakto de pluraj gravaj aŭtoroj kiel William Auld, Baldur Ragnarsson, Roberto Passos Nogueira, Mauro Nervi, Mao Zifu, ktp.
- Tradukado de beletraj tekstoj.
- Rilato inter kantotekstoj kaj poezio.
- Redaktado de internacia kultura kaj literatura revuo (kun Beletra Almanako kiel aktuala ekzemplo).
- Eldonado de E-libroj.
- Recenzado de beletraĵoj.



Mikaelo Bronštejn (el Tiĥvin) estas mondfama Esperanta tradukisto, verkisto, poeto, bardo, kantisto. Li verkis kaj tradukis pli ol 20 librojn. En 2003 li iĝis laŭreato de la literatura premio “Antoni Grabovski”. Seninterrompa kreado enkadriĝas en movadajn aktivecojn – de prezidanto de Soveta Esperanta Junulara Movado (SEJM) en junaĝo ĝis gvidado de artaj programoj en Universalaj Kongresoj. Lastajn jarojn Mikaelo regule turneas en Eŭropo kun kultur-historiaj prelegoj kaj koncertoj. Li havas grandan sperton pri instruado de Esperanto, speciale por lingvaj perfektemuloj, brile gvidis tradukistajn kursojn por diverslingva partoprenantaro.

Historio de Esperanto

Ĉi tiu kurso ne nur prezentas la ĉefajn eventojn en Esperantujo. Ĝi havas plian celon: montri la ĉefajn tendencojn, kiuj influis kaj evoluigis la esperantistan komunumon precipe ĉe ĝia formiĝo.

Oni ekscios respondojn al pluraj demandoj, interalie:

- Kial Zamenhof plurfoje proponis reformi sian lingvon, kaj kial liaj proponoj ne estis akceptitaj?
- Kial la esperantistaj gvidantoj konsilis al Zamenhof kaŝi sian aŭtorecon de la homaranismo?
- Kial la partoprenantoj de la nunaj UK-oj ne faras gravajn decidojn en la kongresoj?
- Kial Esperanto iĝis ne la dua lingvo por ĉiuj, sed la unua lingvo en la esperantista komunumo?

La bazo de ĉi tiu kurso estas la 12-hora kurso “Historio de Esperanto”, kiun A. Korĵenkov prezentas en la Interlingvistikaj Studoj ĉe la universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando). Ĉi tiu kurso celas ne spertulojn pri la temo, sed precipe tiujn, kiuj jam bone konas la lingvon, sed ankoraŭ ne estas bone informitaj pri la historio de la Esperanto-movado.



Aleksander Korĵenkov (naskiĝinta en 1958) estas rusa inĝeniero, ekde 1991 redaktoro kaj eldonisto. Esperantisto ekde 1976. Redaktoro de La Ondo de Esperanto (ekde 1991). Eldonis kune kun sia edzino Halina Gorecka pli ol cent librojn en/pri Esperanto. Aŭtoro de pluraj lernolibroj kaj monografioj. Verkis pli ol mil artikolojn kaj recenzojn en pluraj gazetoj. Ĉefaj verkoj pri la historio de Esperanto: Esperanto post la jaro 2000 (1998), Esperanto en Ruslando (2000, kun Halina Gorecka), Historio de Esperanto (2005), Homarano (2009), Zamenhof (2010), Nia diligenta kolegaro (2018, kun Halina Gorecka).

Priskribo de program-kontribuantoj

Žeňa Belková

Žeňa loĝas en Bratislavo kie ŝi ankaŭ studis matematikon kaj kognajn sciencojn. Ŝi laboras kiel pseŭdoprogramisto kaj partatempe volontulas en edukadaj organizoj, ĉar ŝi kredas je pli bona Slovakio. Krome ŝi amas ĉevalojn, naturumadon, lernadon kaj bonkorajn homojn.



Tomáš Stano

Nuntempe loĝas kaj laboras en Prago, kie li ankaŭ studos post tiu ĉi somero. Estas estrarano de SKEJ kaj ĈEJ pri merkato kaj informado. Li ankaŭ ŝatas sportumadon kaj vojaĝadon.

Pavol Petrík

Longjara tradukisto pri la angla kaj Esperanto, korektisto kaj redaktoro de *Esperantisto Slovaka*, interpretisto de la slovaka en Esperanton dum Esperanto-ekskursoj.



Matthieu Desplantes

Matthieu estas el Francio sed loĝas en Slovakio ekde oktobro 2013. Li studis komputikon dum kvin jaroj en Parizo kaj nun laboras kaj pri komputiloj, kaj pri lingvoj. Li ŝatas lingvojn, vojaĝadon kaj kuiradon.

Peter Baláž

Peter Balaž estas slovaka esperantisto kaj eldonisto loĝanta en Partizánske, kunordiganto de la edukprojekta asocio E@I (ekde 2005) kaj ĉeforganizanto de eventoj SES, KAEST kaj Polyglot Gathering. Nuntempe li estas ankaŭ prezidanto de Slovaka Esperanta Federacio (SKEF). Li estis estrarano de Eŭropa Esperanto-Unio, prezidanto de SKEJ (kiun kunfondis) kaj ankaŭ kunfondinto de Wikimedia Slovenská republika.



Tim Morley

Tim Morley instruas Esperanton, la anglan kaj la francan de antaŭ 20 jaroj. Li instruas ĉe SES ĉiujare ekde 2012. Ekscitas lin reciklado, lingvo-scienco, ekkoni novajn homojn kaj aferojn, kaj stultaj vortludoj.

Manuela Ronco

Mi multe interesiĝas pri socia justeco, alternativaj vivstiloj kaj rilatoj, memplibonigado kaj homa bonfarto. Mi estas kunfondinto kaj redaktoro de la blogo www.egalecen.org.



Konstantin Tikhomirov

...devenas de Rusio, sed loĝas kaj laboras en Pollando. Li instruis Esperanton en diversaj kursoj kaj aranĝoj en Rusio, Pollando, Ĉeĥio, Litovio, Germanio, Italio kaj ĉiujare dum SES-oj en Slovakio (ekde SES-2012). Krom Esperanto, Konstantin interesiĝas pri lingvoscienco, sciencfikcio, historio kaj estas multlingva lernemulo.



Dmitrij Ŝevĉenko, Anna Striganova



Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova estas universitataj instruistoj. Ekde aprilo 2017 ili estas ĉefredaktoroj de la oficiala organo de UEA, la revuo *Esperanto*. Ili ankaŭ eldonas librojn en kaj pri Esperanto en sia eldonejo “Impeto” (<http://impeto.trovu.com>). Dmitrij kaj Anna aktive partoprenas Esperanto-movadon, estas organizantoj de pluraj E-renkontiĝoj, aŭtoras plurajn librojn kaj artikolojn en kaj pri Esperanto.

Christophe Chazarein

Christophe (Kristof) estas esperantisto de 1998. Li loĝas apud Tuluzo, en la sudokcidenta parto de Francio. Li ekinstruis Esperanton en 2006, kaj poste la okcitanan kaj la francan. Li interesiĝas ĝenerale pri lingvoj, kaj pri aktualaj instru-metodoj.



Aida Čižikaitė

Aida Čižikaitė estas el Litovio, urbo Kaunas. Ŝi estas lingvisto kaj juristo laŭ profesie. Ŝi laboras en universitato kaj volontulas en gimnazio. Esperanton ŝi eklernis en 1999. Ŝi estas diplomita Cseh-instruisto kaj studis interlingvistikon en UAM en Poznań. Ŝi kunlaboris kun Lit.EA, ILEI, estis en organiza teamo de kelkaj surlokaj kaj internaciaj aranĝoj (ZT, BET, IKUE-kongreso, ILEI konferencoj (5), UK en 2005).

Andreo Jankovskij

Homo, kiu revas pri SES sur la Marso.



Magdaléna Feifičová (Fejfi)

Fejfi komencis esperantumi en la jaro 1987. Unue redaktis la kluban bultenon *Raportanto*, pli poste la landan bultenon *Esperantisto Slovaka*. Gvidis la Slovakian Asocion de Fervojistaj Esperantistoj kaj organizis krom aliaĵoj la Internacian Fervojistan E-Kongreson en Košice en la jaro 1997. Partoprenis multajn fervojistajn kaj kelkajn universalajn kongresojn, krome multajn aliajn E-aranĝojn. En lastaj jaroj ŝi okupiĝas pri instruado de Esperanto.

Ekaterina Lozina (Miri)

Helpas organizi SES-on kaj interesiĝas pri pluraj aferoj: manfaraĵoj, lingvoj, jogo, homoj, dancoj, katoj... Ne interesiĝas pri: verkado de mempriskriboj.




Kryštof Klestil

La plej krianta ŝtofo, kiun vi iam ajn renkontos. Li naskiĝis kun trikiloj en siaj manoj, liaj lipharoj kreskis en la unua monato de lia ankoraŭ mallonga vivo, nuntempe li kudras, onidire kantas, desegnas, fasonas, scivolemas pri la senco de la vivo tro ofte kaj ĉiam venas al la sama verdikto, ke simple estas sensenca ĝuado de nenio kaj ĉio samtempe.

Imre Keményfi, Anikó Hajós-Bodó

Imre Keményfi kaj Anikó Hajós-Bodó loĝas en Hungario. Imre loĝas proksime al la ĉefurbo, Anikó en sud-orienta urbeto. Imre estas Esperantisto de 10 jaroj, li parolas Esperanton altnivele, kaj lernas instrui ĝin; Anikó estas komencanto de Esperanto.




David Mamsch

Origine el Germanio, li nun estis dum unu jaro kiel volontulo en Slovakio. Eklernis Esperanton en 2015 kaj en la sama jaro partoprenis la SES-on en Slovakio kiel sian unuan internacian aranĝon. Ŝatas ritmojn, rulsketadon kaj riboberan vinon.

Marco Teani

Saluton! Mi naskiĝis pli mapli cent jarojn post la Fondinto ;-) en norda Italio. Esperantiĝis en 1980 dank' al skoltoj kaj forlasis la movadon ses jarojn poste ĉar vivo (amo!) kondukis min en Normandio. Roter dama UK en 2008 estis mia reveno en E-ujo kaj tiu ĉi estas mia dua SES. Mi havas du filinojn kaj nepon ekde unu jaron <3 Mi interesiĝas pri sciencoj kaj lingvoj. Mia pli aĉa difekto estas scivolemeco kaj pli granda kvalito... scivolemeco ;-) Ĝis baldaŭ!



Julia Škarbanj

Mi estas Julia. Mi estas studento ĉe la Nacia Pedagogia Universitato de Dragomanov kaj en la Mezlernejo Gete. Membro de la Moskva Organizo de la MEA MASI. Esperantistiĝo ekde 2017.

Václav Zouzalík

Mi estas komputilisto el Ĉeĥio kun intereso pri persona libereco, historio kaj lingvoj.



**Signe Capion, René G. M. Nielsen**

Signe: Edukita en sporto kaj sano el la universitato. Praktikis akrojogon dum 5 jaroj.

René: Gimnazia instruisto en sporto kaj psikologio. Praktikis akrogon dum unu jaro.

Ĉiuj du tre ŝatas instrui en movado.

Marta Tikhomirov

Marta Tikhomirov estas pola esperantistino, kiu laboras en Vroclava Universitato de Medio kaj Naturscienco ĉe Departamento de Farmakologio kaj Toksikologio. Ŝi estas bestkuracistino kies ĉefa esplorkampo estas farmakokinetiko. Ŝi kontribuas al organizado de SES ekde 2013 jaro.

**Aleksander Korĵenkov**

Ruso. Inĝeniero (dipl. 1980), ekde 1991 redaktoro kaj eldonisto.

Esperantisto ekde 1976. Redaktoro de La Ondo de Esperanto (1991–). Eldonis kune kun sia edzino Halina Gorecka pli ol cent librojn en/pri Esperanto. Aŭtoro de pluraj lernolibroj kaj monografioj. Verkis pli ol mil artikolojn kaj recenzojn en pluraj gazetoj.

Luc Allemand

29-jara esperantisto el Svislando, nun biciklovojaĝanto, survoje haltas en Slovakio por partopreni kaj helpi ĉe SES, en kiu mi jam estis 4-foje.


**Mária Minichová**

...estas slovakia instruistino. Ŝi ekkonis Esperanton meze de la 90-aj jaroj kaj aktivas en la slovakia Esperanto-movado. Ŝi organizas lokajn klubajn turismajn kaj kulturajn aranĝojn, ekspoziciojn, prelegojn kaj lingvokursojn. Ŝi zorgis pri la Esperanto-versio de la dulingva romano "Ĝis Tien - Aŝ tam" kaj tradukis kolekton de tutmondaj fabeloj el la ĉeĥa por radio Muzaiko.

**Priskribo de programeroj**

La detalan programon kun ĝustaj horo kaj ejo bv. konsulti en la programtabulo!

☺ = taŭga por komencantoj / suitable for beginners

**Aligatorejo**

Aligatorejo estas loko kie vi povas praktiki aliajn lingvojn krom Esperanto. Fakte, paroli Esperanton kaj vian denaskan lingvon en la aligatorejo vi ne rajtas! La reguloj estas simplaj: vi skribas nomojn de la lingvoj kiujn vi parolas sur papereton kaj gluas ĝin al viaj vestaĵoj, por ke ĝi estu videbla al aliaj.

Poste laŭ la paperetoj vi serĉas aliulojn kaj babilas pri io ajn. Vi ne devas scipovi multajn lingvojn – nur unu fremda lingvo krom Esperanto sufiĉas por ĉeesti.

Gvidas: David Mamsch



Artaĵoj ☺


Se vi ŝatas pentri, desegni, skribi aŭ simple krei ion tiu-ĉi programero estas ĝuste por vi :) Dum du horoj vi havos eblecon esprimi sciojn kaj sentojn kiuj SES aŭ Esperantujo donis al vi. Kun via konsento ni poste pendigos niajn produktojn por fari la SESejon pli nian.

Gvidas: Žeňa Belková

Akrobata joko (Akrojogo) por komencantoj ☺

Akrobata joko kombinas la trankvilon kaj koncentriĝon de joko kun la luda kunlaboro de la akrobatado. Surbaze de ekvilibro kaj kunlaboro ni instruas al vi kiel flugi sur kaj kun aliaj personoj. Neniuj specialaj kvalifikoj estas necesaj. Kunportu propran jogotapiŝon aŭ dormomaton!

Gvidas: Signe Capion, René G. M. Nielsen kaj Rolf Meier



Arto de tradukado

Tiu ĉi prelego temas pri la arto de tradukado, teknikoj kaj gravaj principoj, kiuj estas aplikataj en tradukado kaj interpretado. Pavol Petrík ankaŭ komparos siajn spertojn pri la tradukado de anglaj kaj Esperantaj tekstoj.

Prelegas: Pavol Petrík

Danckurso – Dancu salson! ☺

Ni lernos la ĝuindajn bazojn de danco, kiuj ebligas vin ĝui la muzikon kaj montros la funkcmankieron de la danco.

Gvidas: Krištof Klestil

Eldonejo “Impeto”: historio, nuntempo.

Eldonejo “Impeto” (<http://impeto.trouvu.com>) jam la 26-an jaron sen-interrompe aperigas librojn en kaj pri Esperanto. Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova rakontos iom pri la agado de eldonejo, prezentos novajn librojn kaj malkovros la planojn de eldonagado de eldonejo por la proksima tempo.

Prelegas: Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko



Elektraj aŭtoj estas fekaj, ĉu ne?

Oni celas forigi poluadon, sed ĉu vere la t.n. “ekologiaj” aŭtoj estas malpli poluemaj? Kaj kiu aĉetus aŭton, kiu bezonas halti ĉiuhore por reŝargi bateriojn? Tim Morley donas respondojn, mallonge prezentas aktualajn fekajn elektrajn aŭtojn kaj hipotezumas pri la venontaj kelkaj jaroj.

Prelegas: Tim Morley

Enkonduko al la franca lingvo

La franca lingvo estas unu el la plej parolataj lingvoj en la mondo, kun parolantoj en ĉiuj kontinentoj. En mia prelego vi ekscios interesajn faktojn pri ĝi kaj ĝiaj historio, elparolo, gramatiko, vortprovizo, ktp.

Prelegas: Matthieu Desplantes

Estonteco de homaro kaj teknologioj

Ni post 10, 100 kaj 1000 jaroj.

En la fino de prelego havos tempon por demandoj kaj elpaŝoj de partoprenantoj.

Prelegas: Andreo Jankovskij

Esperantujo for beginners ☺

So, you are learning Esperanto or are already speaking it?

Great! Now let's discover the Esperanto world a bit!

What's going on in Esperantujo?

In this session you will find out what the most important Esperanto meetings are; what to expect from a "Gufujo" and an "Internacia vespero"; how you can connect with other Esperantists (online and offline); which Esperanto organizations are out there and finally what all those damn abbreviations mean (like IJK, JES, TEJO, UK, PIV, PMEG, TAKE, IJS, ...). The session will mainly be in English.

Prelegas: David Mamsch



Farado de komputilaj ludoj – Kreu novan mondon. Komputil-ludkreado.

Uzante la programon Godot, kiu nuntempe estas unu el la plej popularaj kaj scipovaj ludkreadiloj, vi ekscios kiel krei komputilan ludon kiu estas 3Da, eblas eksporti al ajna sistemo kaj ve ekkonos la bazajn principojn de ludkreado, kiuj utiligeblas poste en viaj ontaj projektoj.

Gvidas: Krištof Klestil

Ĝenerala asembleo de SKEJ

Dum la ĝenerala asembleo ni mallonge informos vin pri kio okazas ene de SKEJ kaj kio (espereble) okazos. Plie okazos voĉdonado pri ŝanĝo de SKEJ statuto. Konkretajn proponojn de ŝanĝoj vi povas jam antaŭe peti de la respondeculoj, se vi volas ilin legi antaŭ la asembleo kaj trakti ĉion pripensi. La Ĝenerala asembleo estas celita ĉefe por la SKEJ membroj, sed ĉiuj kiuj emas povas partopreni ĝin :)

Gvidas: Žeňa Belková, Paulína Jalakšová kaj Tomáš Stano



Gufoj el polimera argilo ☺

Ĉu vi volas mem krei ian belan kaj etan memorigon pri la aranĝo? Mi instruas kiel tre facile fari ĉarmegajn kaj unikajn gufojn.

Gvidas: Miri

Historio de medicino

Rapida kaj tre interesa ekskurso tra diversaj etapoj de disvolviĝo de medicino.

Prelegas: Marta Tikhomirov

Horo kun la aŭtoro

Prezentado de freŝeldonitaj libroj, novaj poemoj kaj kantoj.

Gvidas: Mikaelo Bronštejn

IJK 2019

Ĉu vi jam aŭdis ke venontjara Internacia Junulara Kongreso okazos en Slovakio? Pli precize en la sama regiono en kiu vi nun troviĝas! Dum tiu ĉi prezentado ni parolos pri la avantaĝoj de la regiono, IJKejo, niaj planoj pri la temo kaj programo, ktp, sed fine ni certe lasos iom da tempo por pridiskuti kio mankis al vi dum la antaŭaj IJKj kaj kion vi ĝenerale ŝatus vidi (kaj eviti) dum la esperantaj aranĝoj.

Prelegas: Žeňa Belková kaj Tomáš Stano

Instruado de hungara popolkanto: Vent' printempa... ☺

Kune ni lernos kaj kantos la kanton:

Vent' printempa kirlas akvon; floreto, floreto. Ĉiu bird' elektas paron; floreto, floreto.

Sed mi jam kiun elektu; floreto, floreto. Vi min kaj mi vin elektu; floreto, floreto.

Muzikistoj kun ludinstrumentoj ankaŭ estas bonvenaj!

Gvidas: Hajós-Bodó Anikó, Imre Keményfi

Instruado de slovakaj popolkantoj en Esperanto ☺

Ĉu vi ŝatas kanti kaj amuziĝi? Tiam venu lerni kun ni novajn kantojn en Esperanto, ĉu origine Esperantajn, ĉu tradukitajn el aliaj lingvoj. Bona maniero por lerni lingvon, amuziĝi kaj kunkanti :-)

Gvidas/Instruas/Ludas: Mária Minichová

Ĵetelero ☺

Pretiĝu, por la plej bona sporto vi iam spektos...Ĵetelero! (angle, Ultimate Frisbee) Estas amuzega kaj ĝojplena sporto, kiu ankaŭ estas tre facila por komencantoj lerni kaj partopreni. Do ne atendu, ĉiuj aliĝu!

Gvidas: Tyron Surmon



Kantateliero ☺

En tiu ĉi programpunkto la ensemblo volas kunkanti tradiciajn, popularajn kaj ŝatatajn kanzonojn de esperantistaro kun la publiko. Triopo invitas ĉiujn esperantajn entuziasmojn al gaja, energia, preskaŭ duonhora komuna kantado. Tekstoj estas preparitaj, simple venu kaj ĝuu!

Gvidas: Lidia Komar

Kial nun en fabeloj modas antagonisto?

Dum kelkaj lastaj jaroj oni ofte povas aŭdi kaj legi plendojn: modas malbonaj herooj, infanoj en siaj ludoj rolas vampirojn kaj zombiojn, en la populara arto pli kaj pli ofte monstrecaj imagoj anstatuigas pure belajn, difekto anstataŭigas idealon. Do, socio anime malsanas. Tiuj vortoj estas nek malvero, nek klaĉoj, nek konflikto de generacioj. Hodiaŭ vere modas malicaj herooj, modas antagonistoj, modas vampiroj kaj drakoj. Sed ĉu vere tio estas anima malsano de socio?

Prelegas: Anna Striganova



Kiel efike lerni lingvojn

Prelego pri metodoj de efika lingvolernado, planado kaj memmotivigo.

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

Kiel nia civilizo povas fali; kolapsologio por nia generacio

La prelego havos kelkajn partojn:

1 – Senlima kresko en limigita planedo – signo de malsano, eksponencialo.

2 – Antaŭdiristoj: la komunikiĝo al la Roma klubo.

3 – Aldona problemo: la tuttera varmiĝo.

4 – Sistemaj kaj kompleksaj interplektaĵoj – kvin riskoj kaj multaj danĝeroj: la monda ekonomio, la resurs-manko, l'energielekto, la potenceg-nacioj konflikto, la disvastigo de epidemioj, la teknologiaj disfaloj ktp

5 – Plena civiliz-kolapso: Ĉu eblas? Ĉu denove? Kiam, baldaŭ?

Prelegas: Marco Teani

Kognaj sciencoj kaj lernado

En la pasinta jardeko, la kognaj sciencoj kaj la kono pri la funkciado de la cerbo forte progresis. Ankoraŭ restas multo por malkovri, sed kognaj sciencoj jam donis interesajn respondojn al la demando “kiel oni lernas?”. Tiu prezento celas resumi tiujn malkovrojn kaj iliajn konsekvencojn en serĉado de pli efikaj lerno-strategioj.

Prelegas: Christophe Chazarein

Komedia improviza teatrumado

Kion ni faros?

Ni improvize kreos etajn teatrecajn tute ne preparitajn scenojn. Ni lernos kiel aktori sen preparita teksto, sen preparitaj roluloj, eĉ sen ideo kio povas okazi. Ne nur tio, sed ni eĉ permesos al aliuloj decidi kie kaj kiuj ni estas – kaj samtempe ni bone amuziĝos. Ni lernos aŭskulti partneron kaj akcepti ŝliajn proponojn, kiel ajn absurdaj ili estos. La ateliero plej taŭgos por tiuj kiuj senprobleme kaj senpene komprenis tiun ĉi informon.

Gvidas: annA Skudlarska



Komunikado inter arboj

Prelego dediĉita al personoj, kiuj interesiĝas pri natursciencoj kaj ŝatantoj de naturo.

Prelegas: Marta Tikhomirov

Konatiĝo kun la litova lingvo

Ĉu Zamenhof parolis la litovan? Ĉu vere ĝi estas la plej malfacila lingvo en mondo? Kiom diferencas sanskrito de la nuntempa litova lingvo? Ĉu eblas, ke du litovaj vilaĝanoj ne komprenas unu la alian, eĉ se ili parolas la saman lingvon? K.t.p., k.t.p. Nur unu rimarko. Fama franca lingvisto Antoine Meillet skribis: “Tiu, kiu volas scii, kiel parolis niaj praaĵoj, devas veni por aŭskulti, kiel parolas litovo vilaĝano.” Vi jam interesiĝis? Do, – venu kaj eksciu pli. Ankaŭ Vi povos lerni litovan vorton, la plej facilan por esperantistoj.

Gvidas: Aida Čižikaitė

Kreado de 2D kaj 3D ludoj



Vi povos elekti heroon, fonon kaj monstrojn el proponitaj bildoj aŭ trovi ilin en la reto. Poste ni aldonos 10 liniojn da kodo por ke via heroo ekmoviĝu. Ankoraŭ 10 linioj kaj ĝi kapablos kolekti stelojn... 30 musklakoj kaj viaj monstroj fariĝos vere danĝeraj :)

Vi povos elekti 3D heroon kaj movojn por ĝi. Poste ni kreos montojn, herbojn kaj vojojn. Iom da vera magio, kaj jen, finfine ni vagadas kaj kolektas stelojn en kreita de ni mondo.

Prelegas: Andreo Jankovskij

Kubb — sveda blokludo ☺

Kubb estas subĉiela ludo, en kiu oni ĵetas lignajn bastonojn kaj celas faligi lignajn blokojn. Teamantoj laŭvice provas batfaligi lignajn bastonetojn ĉe la flanko de la alia teamo, la fina celo de la ludo estas faligi la Reĝon antaŭ ol kontraŭulo faligas ĝin. Ekzistas kelkaj limigoj kaj reguloj rilate al ĵettekniko por la bato, ordo de bato laŭ nivelo de la bastonetoj kaj ktp. La ludo devenas de Svedio. Pli longa kaj detala Esperanta priskribo troviĝas en Vikipedio.

Gvidas: Miri



Foto: Peter Voeth, Wikimedia Commons

Kurseto de la ĉeĥa lingvo

Unu hora kurseto, por tiuj kiuj volas lerni iomete de la Ĉeĥa, plej proksima linvo al la Slovaka. Vi eklernos alfabeton, bazajn frazojn, kaj ni finos per langorompiloj, ĉu vi konas signifon de frazo Strč prst skrz krk?

Gvidas: Martin Sedlak

Kurso de la rusa

Kurso de la rusa lingvo – ellernu la cirilan alfabeton kaj simplajn rusajn frazojn.

Gvidas: Konstantin Tikhomirov

Kurso de la slovaka

La slovaka lingvo estas nomata Esperanto de la slavaj lingvoj. Eksciu pri ĝia alfabeto, kuriozaĵoj, gramatiko, vortoj (ĉu vi konas tiun plej longan?). Konstatu, ke multaj slovakaĵoj estas por vi – dank’ al Esperanto – konataj. Lernu la du plej ĝeneralajn slovakaĵojn, per kiuj oni povas diri (preskaŭ) ĉion. Kaj miru pri la diferencaĵoj en la slovaka kaj ĉeĥa lingvoj, kiuj ofte estas konsiderataj la samaj.

Gvidas: Magdaléna Feifčová

Kurso de trikad-kroĉetado - Kroĉetu pli bone ol via avino. ☺

Ĉu vi iam ajn volis lerni kroĉeti sed neniam trovis tempon? Bonege, venu kaj vidu pri kio temas, ni ekkroĉetos la sencon de vivaj problemoj fundamente enkoditaj en niaj DNA... ah pardonu, fakte vi ekkroĉetos bazajn aferojn, kiuj poste ebligas vin realigi eĉ ambiciajn projektojn.

Gvidas: Krištof Klestil



Kvizo: Kiu estas sur la ekrano?

Kvankam kvizoj ofte okazas en niaj kongresoj, renkontiĝoj kaj kluboj, la partoprenantoj de SES povos partopreni en io nekutuma, nome: la kvizanoj devos identigi portretojn de famaj esperantistoj, kiuj estos monrataj sur la ekrano. La kvizon kungvidos Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov (Kaliningrado, Ruslando), kies komuna enciklopedia verko Nia diligenta kolegaro estos la ĉefpremio en la kvizo.

Gvidas: Aleksander Korĵenkov

La lingvoj de miaj gentoj

Zamenhofeca etoso de la okcidentukraina urbeto post la Dua mondmilito. Samstrate loĝas, amikiĝas, kunludas geknaboj rusaj, ukrainaj, hebreaĵ, polaj, ciganaĵ. Ne gravas por ili la lingva problemoj, ĉar ekde la naskiĝo ili ekparolis ĉiujn lingvojn de la strato. Pri la etoso de tiu kunvivado kaj aparte pri ĉiu el la tri ĉefaj lingvoj rakontas kaj kantas Mikaelo Bronŝtejn.

Pelegas: Mikaelo Bronŝtejn

La mondoj de la fratoj Strugackij

Kio okazus, se...? Ekzemple, se tera spacesploristo trafus planedon kun homeca civilizo simila al la tera mezepoko? Aŭ se ekzistus speciala esplorinstituto pri magio kaj misteroj? Aŭ se du mondoj, paralele ekzistantaj en la tempofluso, ekesplorus unu la alian? Aŭ... Ĉiam ekstersupozan, rave atentokaptan respondon al tiuj demandoj donas verkoj de la brilaj inventistoj de situacioj, plej famaj sciencfikciaj verkistoj de Rusio, fratoj Arkadij kaj Boris Strugackij. Laŭ kontrakto, signita de eldonado “Impeto” kaj la aŭtoro en 1996, dek du romanoj de la fratoj Strugackij rajtas aperi en Esperanto. Ĝis nun aperis naŭ, kaj la laboro daŭras. Mikaelo Bronŝtejn prezentas la fratojn Strugackij – ilian ekstreme malfacilan, obstinan iron al monda rekono, verkojn la plej ŝatatajn kaj amuzajn eventojn dum sia traduka laborego super tiuj verkoj.

Prelegas: Mikaelo Bronŝtejn

Provizora programtabulo

2018-07-14 - sabato		2018-07-15 - dimanĉo		2018-07-16 - lundo		2018-07-17 - mardo			
Alventago		Nacia tago		Hobia tago		Lingva tago			
7:30- 8:45 9:00-... 10:30-11:45 ...-13:00 13:00-14:00	Alvenado, akceptado, enloĝigado.	Matenmanĝo		Matenmanĝo		Matenmanĝo			
		Instruado		Instruado		Instruado			
		Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)		Kafpaŭzo (15 min.)			
		Instruado		Instruado		Instruado			
		Tagmanĝo		Tagmanĝo		Tagmanĝo			
14:00-15:00		Prelegejo 1	Prelegejo 2	Prelegejo 1	Prelegejo 2	Prelegejo 1	Prelegejo 2	Alliloke	Alliloke
15:00-16:00		Liptovský Mikuláš kaj ĝiaj legendoj	"Esperantujo for beginners" (<i>angle/english</i>)	Origamio	Ukrainaj urboj, prezento de filmeto (en Kinejo)	La mondoj de fratoj Strugaĉkij (Libroservo)	Konatiĝo kun la litova lingvo	Muzika lingva kvizo: divenu la lingvon de la kanto	La lingvoj de miaj gentoj (Libroservo)
16:00-17:00		Instruado de slovakaĵoj popolkantoj en Esperanto	Kial nun en fabeloj modas antagonisto? (en Libroservo)	Dancurso – Dancu saison! (en Koncertejo)	Estonteco de homaro kaj teknologioj	Nia diligenta kolegaro: prezentado de la libro (Libroservo)	Artajoj	Kurso de la rusa	Revuo "Esperanto" en 111-a jaro (Libroservo)
17:00-18:00	Alvenado, akceptado, enloĝigado	Kurso de la slovaka (1/2)	Jettelero / "Ultimate Frisbee" (ekstere)	Vikmedia komunuejo (en Komputilejo)	Instruado de hungara popolkanto "Vent" printempa...	Kvizo: Kiu estas sur la ekrano? (Libroservo)	Kurso de la slovaka (2/2)	Enkonduko al la franca lingvo	Gufoj el polimera argilo (Gufujo)
17:00-18:00		Trejnado por anĝeloj kaj helpemuloj	Eldonejo "Impeto": historio, nuntempo (en Libroservo)	Peĉakuĉo "Ĝenerala"	Kantateliero	Preparado por teatra kvizo - "La Dikoderoj" (Koncertejo)	Kurso de la ĉeĥa lingvo	Skandinava lingvaro	La Ondo de Esperanto: prezentado/renkontiĝo kun legantoj (Libroservo)
18:00-19:00	Trejnado por anĝeloj kaj helpemuloj	Paroliga rondo - komencantoj	Paroliga rondo - progresantoj	Paroliga rondo - komencantoj	Paroliga rondo - progresantoj	Komedia improvizita teatraĵo (Koncertejo)	Paroliga rondo - komencantoj	Paroliga rondo - progresantoj	Komedia improvizita teatraĵo (Koncertejo)
19:00-20:00	Vespermanĝo	Vespermanĝo		Vespermanĝo		Vespermanĝo		Vespermanĝo	
20:30-21:30	Oficiala malfermo	Koncerto: ensemble Poludnica (placo en la urbocentro)		Kuirarta festivalo (20:45 - 22:00 daŭro, 20:15 - pretiĝo)		Dubarda koncerto (Bronŝtejn, Handzlik) - en la sinagogo			
21:30-22:30	Interkona vespero	Koncerto: Barbora Hazuchova (placo en la urbocentro)		22:00 - 22:30 Ciganaj Kantoj (Saša Pilipović)					
22:30-xx	Libera programo			Diskoteko	Preparado de la kuirlibro "Mondo surtelere 2018" (Gufujo)	Plurlingva karaokeo (22:00)		Homlujoj (Gufujo)	

Taŭga por komencantoj - suitable for beginners

Tutsemajnaj programeroj: Libroservo (8:00-9:00, 14:00-19:00) | Trinkejo (13:00-00:00) | Gufujo (22:30-xx:xx)

Estas eble ludi dancapisaĵojn ludojn dum la tempo de funkciado de Trinkejo (tuj apud la Trinkejo)

Ĉiu prelego daŭru maks. 50 min. por havi paŭzon inter programeroj kaj liberigi la salonojn por sekva programero

Provizora programtabulo

	2018-07-18 - merkredo	2018-07-19 - ĵaŭdo	2018-07-20 - vendredo	2018-07-21 - sabato	2018-07-22
Horoj	Ekskursa tago	Esperanto-tago	Faka tago	Sporta tago	Forira tago
7:30- 8:45	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo	Matenmanĝo
9:00-...	Libera programo	Instruado	Instruado	Instruado	Instruado.
10:30-11:45		Kafpaŭzo	Kafpaŭzo	Kafpaŭzo	Disdono de diplomoj.
...-13:00		Instruado	Instruado	Instruado	Tagmanĝo
13:00-14:00	Tagmanĝo	Tagmanĝo	Tagmanĝo	Tagmanĝo	
14:00-15:00	8:45 - Tuttagaj EKSURSOJ (Monto Poludnica, Spiŝa burgo, Levoĉa kaj Poprad) 14:00-19:00 EKSURSO (Iago Liptovská Mara, naĝado en Tatralandia, arbara promeno)		Aliloke	Aliloke	Oficiala fino de la SES. Forveturado.
15:00-16:00		Litovaj manĝokutimoj	Kubbb - Sveda blokludo (ekstere)	Utiliaj nodoj (Gufujo)	
16:00-17:00		Malkovro de la itala	Horo kun la aŭtoro (Libroservo)	Akroĵogo (ekstere)	
		Raraj radiokoj de Esperanto	Kreado de 2D kaj 3D ludoj (Komputilejo)	Farado de komputiliaj ludoj (Komputilejo)	
17:00-18:00	Libera programo	Peĉakuĉo "Esperantujo"	Kurso de trikado kaj kroĉetado (Gufujo)	Ĝenerala asembleo de SKEJ (en la slovaka) (Ĉambro №40)	Sportaj konkursoj
18:00-19:00		Paroliga rondo - komencantoj	Paroliga rondo - progresantoj	Paroliga rondo - progresantoj (preleĝejo 2)	
19:00-20:00	Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo	Vespermanĝo	
20:30-21:30	La Kredito (teatraĵo: Handzlik, Pilipoviĉ)	Koncerto: E-familio (20:30 - 21:00)	Internacia vespero	La dikoderoj (Luko)	
21:30-22:30		Koncerto: Kaŝi (21:00 - 22:00)		Adiaŭa vespero	
22:30-xx		Diskoteko	Homlupoj (Gufujo)	Diskoteko	

La Ondo de Esperanto

La monata gazeto La Ondo de Esperanto, fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov aperis ĝis la revolucia jaro 1917, kiam ĝi ĉesis por 74 jaroj kaj estis refondita en majo 1991 kelkajn monatojn antaŭ la kolapso de Sovetunio. Nun La Ondo de Esperanto estas vastatema internacia gazeto en Esperanto. Ĝi enhavas primovadajn informojn kaj analizan materialon pri la Esperanto-movado, ampleksan kultursekcion kaj artikolojn pri ĝeneralaj ne Esperantaj temoj. En 2007 La Ondo lanĉis paralelan bitversion (pdf), kaj ekde 2017 ĝi aperas nur kiel bitgazeto laŭ la normoj pdf kaj ePub. La gazeton eldonas kaj redaktas en Kaliningrado (Ruslando) Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov.

Prelegas: Aleksander Korĵenkov.

Liptovský Mikuláš kaj ĝiaj legendoj

Kun nia ĉi-jara SES-urbo estas ligitaj du bonfarantoj: unu sanktulo (Nikolao) kaj unu rabisto (Jánošík). Krome ankaŭ aliaj legendoj ligiĝas kun la loko. Venu kaj konatiĝu kun ili.

Prelegas: Magdaléna Fejfičová

Litovaj manĝkutimoj

Ĉiu popolo havas sian vivmanieron, kiun reprezentas per dancoj, kantoj, lingvo, nacia karaktero, tradicioj, moroj, kutimoj, ritoj, superstiĉoj, naciaj vestaĵoj. Ne malpli interesa estas kuirarto de ĉiu lando kaj popolo. Oni eĉ kreas kuirartajn itinerojn, vojojn de biero aŭ vino. Foje oni diskutas, disputas eĉ kverelas al kiu popolo apartenas ideo de tiu aŭ alia plado, kies recepto estas plej ĝusta, plej originala, aŭtentika aŭ plej malnova. Se estos intereso, eblos kolektiĝi kaj interŝanĝi siajn spertojn. Eble ni eĉ sukcesos ekhavi interesan kolekton kaj publikigi rete nian komunan produkton “Mondo sur la telero (2018)”.

Prelegas: Aida Čížikaitė

Malkovro de la itala

Temas pri mallonga prezentado kun poste kurseto. Unue partoprenantoj kundividus siajn konojn (nomoj, de manĝaĵoj, markoj, lokoj, personoj ktp); ekde tio mi prezentos ĉefajn gravajn karakterojn de la lingvo kompare al E-o: prononcon, ortografion kaj bazajn aspektojn de la gramatiko; fine ni lernos saluti, prezenti sin mem, fari bazajn demandojn kaj ni kantos kanteton.

Prelegas: Marco Teani

Mallonge pri Litovio

Ĉi-jare mia lando Litovio festas centjariĝon de sia sendependeco. Malgranda lando en formo de koro ĉe Balta maro. Nekredeble bela. En kruciĝo de vojoj por pli grandaj apudaj landoj. Iam estis plej granda lando de Eŭropo, poste entute malaperis de monda mapo... Tamen nun estas sendependa kaj festas sian centjariĝon. Ankaŭ por Esperanto Litovio havas grandan signifon. Pri tio kaj alio mi volas rakonti al vi. Venu por aŭskulti kaj poste vizitu mian landon dum esperanto aranĝoj (BET, “Boatado” ktp.) kaj ne nur.

Prelegas: Aida Čížikaitė

Manlaboraĵoj el fliso ☺

Plej verŝajne vi ofte rimarkas, ke homoj havas ion originalan, nenie antaŭe viditan kaj opinias, ke tion produkti estas ege malfacile, oni bezonas eksterordinaran talenton. Por veraj artaĵoj – jes. Tion produktas Givenchy, Dior, Chanel. Sed ankaŭ ili produktas simplajn aferetojn. Kaj ne anĝeloj kun ili kunlaboras. Ĉion faras homaj manoj. Se vi volas komenceti, au almenaŭ kuraĝigi vin – venu! Se estos deziro, eble ni provos ion fari el lano. Flison, lanon, formojn mi havos. Tamen, se vi ion kunportos – ne estos malbone.

Gvidas: Aida Čížikaitė



Muzika lingva kvizo ☺

Ĉu vi scipovas rekoni la litovan aŭ la hebrean, la vjetnaman aŭ la ukrainan? Vi aŭdos kantojn en diversaj lingvoj de la mondo kaj via tasko estas rekoni la lingvon. Por la plej lertaj lingvemuloj estos premioj!

Gvidas: Matthieu Desplantes



Nia diligenta kolegaro - prezento de la libro

La enciklopedio “Nia diligenta kolegaro” (NDK) prezentas ducent eminentajn esperantistojn ekde Zamenhof ĝis la nuntempaj Esperanto-agantoj en diversaj sferoj de la movado. Malkiel en la “Enciklopedio de Esperanto” (eldonita antaŭ pli ol 80 jaroj) en NDK ĉiu artikolo sekvas la saman skemon. Ĉiun artikolon garnas bibliografioj kaj fotoportretoj. Librofine oni trovas utilajn tabelojn. La enciklopedion verkis Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov, la eldonanto kaj redaktanto de la populara gazeto “La Ondo de Esperanto”. Pli detale pri la enciklopedio: <http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120.htm>

Prelegas: Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov.

Novajoj de E@I

E@I ekde sia komenco antaŭenigadas edukadon diversmaniere kaj diversforme – retejoj, aranĝoj, eldonaĵoj, kampanjoj... En nuna momento venas tempo por eĉ pli da aktivecoj en tiu ĉi kampo kun plia profesiiĝo, oficiala rekonado kaj pli vasta kunlaboro. Prezentitaj estos la plej freŝaj atingoj kaj la plej aktualaj edukaj projektoj.

Prelegas: Peter Baláž



Origamio ☺

Origamio, foje nomata origamo, estas tradicia japana arto de paperfaldado. Oni uzas paperfolion kaj faldas el ĝi figuron, sen tondi la materialon. La figuroj povas esti bestoj, (ankaŭ homoj), transportoj, abstraktaj figuroj, ktp. la vorto venas de la japana oru, faldi, kaj kami, papero.

Gvidas: Tomáš Stano

Peĉakuĉo: “Ĝenerala” kaj “Esperantujo”

Kio estas peĉakuĉo?

Peĉakuĉo estas prezentformato de mallongaj elpaŝoj, intence limigitaj je formo kaj daŭro. La celo de tiaj prezentaĵoj estas rapide konatigi la spektantojn kun diversaj interesaj ideoj, projektoj kaj temoj. Dum ĉi-jara SES ni planas okazigi 2 peĉakuĉojn: unu estos ĝenerala, kaj en la alia temo nur pri Esperantujo!

Reguloj de peĉakuĉo

1. Via prezentaĵo (farita en la programo PowerPoint, LibreOffice Impress aŭ similaj) devas enhavi ĝuste 20 lumbildojn.
2. Ĉiu folio de la prezentaĵo estas montrata nur dum 20 sekundoj. Do, via akompana komento por ĉiu folio devas daŭri 20 sekundojn.
3. Suma tempo de prezentaĵo estas 6 minutoj 40 sekundoj.
4. Sur la foliojn de la prezentaĵo metu nur bildojn! Foje eblas aldoni titolojn — sed mallongajn.
5. Via rakonto ne dublu la informon sur la folioj de prezentaĵo.
6. Post prezentaĵo vi havos 6 minutojn kaj 40 sekundojn por respondi demandojn de la spektantoj. Sendu viajn prezentaĵojn al ses@ikso.net!

Por pli da informoj pri peĉakuĉo, vidu nian Facebook-paĝon.

Gvidas: Krištof kaj Miri

Preparado por teatra kvizo “La Dikoderoj” (teatra ateliero 4-8 personoj)

En tiu ĉi teatra ateliero ni inventas kaj provludas kelkajn skeĉojn (skeĉo = komika sceno, prezentata ŝerco) por poste prezenti ilin en SES! Estos demandoj rilate al nekonataj vortoj kaj al kulturaj kaj historiaj temoj. Ni preparos en amuza maniero la prezentadon de diversaj ĝustaj kaj malĝustaj respondoj al tiuj demandoj.

Gvidas: Luko Allemand

Prezento de TEJO

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) estas organizo de junaj parolantoj de Esperanto kun individuaj membroj kaj landaj sekcioj en ĉirkaŭ 40 landoj. Ĉefa sidejo troviĝas en Roterdamo, Nederlando. Venu ekscii pli da informo!

Prelegas: Hoan Tran



Raraj radikoj de Esperanto

Prelego pri malpli oftaj radikaj vortoj de Esperanto.

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

Revuo Esperanto en 111-a jaro.

Redaktoroj de la oficiala organo de UEA revuo Esperanto prezentos la periodaĵon, rakontos pri interesaj faktoj kaj respondos la demandojn.

Prelegas: Anna Striganova, Dmitrij Ŝevĉenko

Seksneŭtrala esprimado en Esperanto

Ĉu vi iam bezonis paroli al granda amaso da homoj? Ĉu vi iam skribis leteron al nekonato? Ĉu vi ne volas scii kiel komuniki sen danĝero de diskriminacio aŭ ofendo? La jena prelego montros al vi eblajn direktojn por neŭtrala komunikado jam en nuntempa Esperanto.

Prelegas: Václav Zouzalík

Skandinava lingvaro

Prelego pri skandinava lingvaro (islanda, feroa, norvega, sveda kaj dana lingvoj).

Prelegas: Konstantin Tikhomirov

SKEJ sinprezentas

Prezento de Slovacia Esperanto Junularo kaj ĝia agado ekde SKEJ revivigo kiu estis planita dum trajnvojaĝo el JES 2014-2015 ĝis nia esperplena estonteco :) Ĝi estas celita por ĉiuj kiuj neniam aŭdis pri la organizo, sed ankaŭ tiuj kiuj jam konas ĝin sed ŝatus scii pli pri kion ni nuntempe faras kaj planas.

Prelegas: Žeňa Belková kaj Tomáš Stano



Trejnado por anĝeloj kaj helpemuloj

Vi estas helpemulo, kaj vi aliĝis al SES kiel anĝelo aŭ helpanto. Aŭ vi simple volas lerni ion utilan, pri kiel kontribui al alies bonfarto dum E-eventoj. Jen trejnado por vi! Per ĝi, vi iĝos pli konscia kaj memfida en la helpado, kaj vi povos tuj praktiki tion dum la semajno.

Gvidas: Manuela Ronco

Utilaj nodoj ☺

Nodado estas pli ol nur ligado de ŝuoj! Nodoj utilas por fiksi ion, por fari maŝon, por konekti ŝnurojn kaj multe pli. Do venu por lerni kelkajn interesajn kaj utilajn nodojn!

Gvidas: David Mamsch

Ukrainaj urboj, prezento de filmeto

Mi volas prezenti al vi kultur-historian filmeton pri Ukrainio. Kie vi povas viziti la ĉefan placon de la lando, rigardi malnovajn preĝejon, admiri la Karpatojn kaj promeni laŭ la marbordo de la Nigra maro.

Prezentas: Julia Ŝkarbanj, Andreo Jankovskij



Vikimedia Komunejo

Ĉu vi ŝatas foti kaj kundividi viajn fotojn kun la mondo? Ĉu vi vizitis nekutimajn lokojn aŭ dokumentas Esperanto-eventojn? Ekkonu la projekton Wikimedia Komunejo de kie Vikipedio prenas fotojn por siaj artikoloj kaj en kiu povas kontribui ankaŭ vi! (Propraj fotoj kaj propra komputilo estas avantaĝaj tamen en la Komputilejo estos disponablaj lokaj komputiloj.)

Prelegas: Václav Zouzalík



Vespera programo Koncertoj

Nacia vespero




Poludnica

El la vilaĝo Závažná Poruba devenas folkloro grupo Poludnica, kiu konsistas el 26 membroj. La grupo prezentas kaj konservas por sekvontaj generacioj lokan folkloron kaj kutimojn. Ili ofte partoprenadas en diversaj okazaĵoj. Programo de la grupo konsistas el diversaj dancoj kaj kantoj, reprezentantajn ĉefe la tradiciojn de la regiono Liptov.

Barbora Hazuchová

Barbora Hazuchová estas juna slovaka kantistino el Liptovský Mikuláš. Ŝi kantis de sia naskiĝo kaj frekventis artan bazlernejon, kie ŝi partoprenis kurson de kantado. Ŝi ankaŭ partoprenis diversajn lokajn konkursojn. Antaŭ 3 jaroj ŝi partoprenis internacian konkurson, kie ŝi estis inter la 8 plej bonaj kantistoj el Ĉeĥio kaj Slovakio. Tiu ĉi konkurso estas vere grava turnopunkto en ŝia vivo, ĉar post la konkurso ŝi kantas sur grandaj podioj, kiuj ĉiam pli grandigas kun ŝiaj sukcesoj.



Ciganaj Kantoj

Saša Pilipovič jam 31 jarojn ludas spektaklojn en Esperanto. Ĉar li ankaŭ estas muzikisto kaj kantisto, li decidis prezentiĝi al esperantista publiko per koncerto de ciganaj kantoj en Esperanto. Tutkore helpis lin amikoj kaj multjaraj kunlaborantoj Mikaelo Bronštajn kaj Nikola Rašiĉ per tradukoj de la kantoj el la rusa, serba kaj romaa lingvoj ĉar la kantoj ĉefe venas el tiuj teritorioj. Saša kantas kaj recitas kelkiun ciganan poemon. Ciganoj estas homoj nomadaj, ili ŝatas ĝojfesti kaj havas la esperon, ke la mondo estos pli bona.



Li estas profesia aktoro en la plej malnova serba teatro en Kragujevac. Li laboris kiel parolisto en esperanta elsendo de Radio Zagreb, aktoris esperante dum UK-oj en Havano, Monpeliero, Zagrebo, Fortalezo, Geteborgo, Vilno, Jokohamo, Roterdamo, Kopenhago, Hanojo, Bijalistoko, Rejkjaviko. Fondinto de "Shelter sceno" kaj "Societo Espero Kragujevac".

Dubarda koncerto: bardo sen barbo kaj bardo kun barbo



Mikaelo (Moissej) Bronštejn (1949), verkisto, tradukisto, kantaŭtoro, naskiĝis en Ukrainio, sed daŭre loĝas en Rusio, apud Sankt-Peterburgo. En junaĝo ludis gvidajn rolojn en la Sovetia Esperantista Junulara Movado (SEJM). Ekde 1992 verkis kaj eldonis 43 librojn, i.a. kvar originalajn romanojn, sep originalajn poemarojn ktp. plus kelkajn KD-jn. Laŭreato de la premio Antoni Grabowski (2004) kaj de OSIEK-premio (2012). Dum lastaj 25 jaroj efektivigis pli ol 70 turneojn en eŭropaj kaj alikontinentaj landoj, prelegis kaj koncertis en kadre de kelkaj Universalaj Kongresoj kaj multaj aliaj amaskunvenoj de esperantistoj. Dum tiu ĉi SES li prezentiĝos plurmaniere. Li ne nur aperos en la duopa barda koncerto, sed ankaŭ prelegos pri tre interesaj temoj kaj [instruos literaturan kurson](#).

Georgo Handzlik, bardo sen barbo, tre bone konata Esperanta instruisto, poeto, kantisto, aŭtoro de kantoj, aforismoj, dramoj, koncertis en 26 landoj. Dum SES li prezentiĝos kun Mikaelo Bronštejn en la Dubarda koncerto kaj en la teatraĵo La kredito kune kun Saša Pilipović, kiun li jam prezentis interalie en la UK 2016 en Nitra.



E-FAMILIO

Muzikgrupo E-FAMILIO estas intergeneracia grupo je simpatianoj de Esperanto el Nowy Sącz (PL), kiu agas de 2016j. Ĝi konsistas ĉefe el amatora gekantistaro (ekzemple Koruso de Senioroj kaj ensembletoj de lernantoj), sed ornamas ĝin ankaŭ profesiaj kantistoj kun operaj kapabloj kaj klasika repertuaro. Dum SES 2018 prezentiĝos al la ĉeestantoj nur pli juna parto de la ensemblo, Trio Lidia, Patrycja kaj



Eliza sub gvido de Ata Kaczanowska. Oni prezentos la kantojn jam konatajn al esperantistoj, sed ankaŭ speciale tradukitajn por ili.

E-FAMILIO jam estas diskonigita inter esperantistaro per ĉeesto dum multaj E-eventoj en Pollando kaj eksterlande, gajnis kelkfoje diversajn konkursajn kaj festivalajn premiojn.

En Liptovsky Mikulas ili prezentos mallongan Koncerton kaj krome kantigos la publikon per propono komune kanti la plej popularajn kantojn en Esperantujo. Kunkantu kun ili!

Kaŝi

Kaŝi (veranome Carsten Schnathorst) estas germana muzikisto kaj esperantisto. Li venas de Osnabrück kaj loĝas en Hamburgo. Tie li ludas ĉe la bando [The Living Music Box](#). Carsten kantas kaj ludas pianon. Lia kantaro enhavas proprajn kantojn kaj bone konatajn el la tuta mondo.

Dum SES li mojosigos la korojn de la publiko per sia mikso de propraj esperantaj kantoj, internacia furora muziko kaj aliaj konataj Esperanto-kanzonoj kaj pere de sia markanta voĉo.



Aliaj vesperaj programeroj

Internacia kuirarta festivalo ☺

Ĉu vi interesiĝas pri la kulturoj de la mondo? Jen oportuno ekkoni la gustojn de aliaj landoj. Dum la festivalo vi povos senpage elprovi diversajn eksterlandajn specialaĵojn. Por sukcesa festivalo, ĉiu partoprenanto kunportu ion de sia lando (manĝeton, sukeraĵon/kukon/keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon, ktp.). Plej bonas famaj aŭ strangaj aferoj (aŭ ambaŭ), kiujn oni ne sukcesas aĉeti eksterlande. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitaĵojn kaj la ĉambro iĝos bazaro de malsamaj gustoj.



La Kredito de Jordi Galcerán

Teatro VERDA BANANO

Unuavide banala historio. Al banko venas kliento, kiu petas krediton. Tamen li ne havas ajnan garantiaĵon. Kiam direktoro de la banko rifuzas doni al li la krediton, la kliento elpensas nekutiman formon de ĉantaĝo. Temas pri virino, sed por scii pli, vi devas mem viziti la spektaklon.

La Kredito estas inteligenta teatraĵo kun viglaj dialogoj kaj turnopunktoj aperas de la komenco ĝis la lasta sceno. Unu el la aktoroj ludinta en la hispana versio diris: „Se ni farus paŭzon ĉiufoje kiam la publiko ridis, ni neniam finus la spektaklon.”

La Kredito verkita en 2013 jaro de fama hispana dramverkisto Jordi Galcerán estis prezentata en Hispanio, Argentino, Grekio, Meksikio, Panamo, Finnlando, Peruo, Germanio, Aŭstrio, Ĉilio, Hungario, Italio kaj Pollando.

Traduko: Georgo Handzlik kun helpo de Rubi Birden

Reĝisoris: Kuba Abrahamowicz

Aktoras:

Sasa Pilipovic – Antonio

Georgo Handzlik – Direktoro



Internacia vespero ☺

Dum internacia vespero amuzas la partoprenantoj la partoprenantojn. Dum ĉi tiu vespero vi havas eblon (kaj unikan, neripeteblan ŝancon :-)) prezenti al aliaj vian talenton, viajn kapablojn, vian artemon. Elektu kanton, dancon, deklamadon aŭ ion alian, kaj prezentiĝu kun via programero – por ke la vespero estu vere amuza kaj internacia. Jam anticipe kontaktu gvidantojn pri la detaloj.

“La Dikoderoj”

En tiu nekutima formo de kvizo vi renkontos certe interesajn demandojn kaj – kiam “la dikoderoj” eniras la scenejon – ankaŭ tre amuzajn respondojn. Sed ne atendu, ke ili estu ĉiam raciaj...

La gastoj ludas kontraŭ la “dikoderoj”, kiuj prezentos al ni la diversajn respondojn en amuza maniero. Sed kiu estas la ĝusta? Por akiri poentojn la gastoj devas diveni ĝuste. Do venu por ĉeesti tiun spektaklon kaj helpi al la gastoj! “La dikoderoj” estos gvidata de Luko (Luc Allemand).



Adiaŭa vespero ☺

Lasta vespero de SES devas esti la plej bona! :-) Ni disdonos kelkajn premiojn, ne rajtas manki la SES-kanto, statistiko pri la aranĝo, adiaŭoj, dankoj kaj kompreneble – bonega etoso kaj loooonga amuziĝo lastnokta.

Aldonaj programeroj

Paroligaj rondoj ☺

Ni rekomendas al vi ĉiuj partoprenadi ilin – se vi volas plibonigi vian lingvo-nivelon, ekzerciĝi pri komunikado kaj parolado en Esperanto, la paroligaj rondoj (ĉiuvespere) estas ĝuste por vi! Nepre kontrolu sur la program-tabulo la lingvo-nivelon kaj klason, en kiuj ili okazas!

Sportumado ☺

Dum la tuta aranĝo estas je via dispono diversa sport-ekipaĵo kaj eblo sporti. Senpage disponeblas: tablotenis, teniso, badmintono, tabla piedpilko, uzado de sportejo.

Bv. kontakti organizantojn aŭ viziti la organizan ĉambron, por ricevi tie la sportan ekipaĵon.

Prizorgas la sportan programon: Tomáš Stano

Trinkejo ☺

Ĉiutage ĝis la nokto nokto fin' estos malfermita la Trinkejo kun bongustaj drinkaĵoj, kie vi povos pasigi vian tempon antaŭ kaj post la koncertoj, aŭ dum la tago, se vi enuus :) Afablaj trinkejestroj garantios la bonan etoson :)



Diskejo ☺

Dum pluraj noktoj atendos vin diskotekoj kun internacia muziko de diversaj muzikstiloj. Tuj apud Trinkejo, en la diskejo vi havos eblon eluzi vian energion, se ajna restos al vi post la tuta tago :) Amuzemaj kaj dancemaj partoprenantoj, nepre venu kaj etosigu la noktan vivon dum SES!



Gufujo ☺

Tradicia ejo de Esperanto-aranĝoj: teejo, kun eblo trankvile, en silento ĝui la etoson, babili kun amikoj, ripozi, gustumi teojn. Ĉu diskejo tro bruas por vi? Do jen la gufujo – la ĝusta loko por vi!

Je via dispono do estos ĉio bezonata en Gufujo (teoj, akvo, kuketoj ktp.).

Kinejo ☺

Ĉiutage estos projekciataj filmoj kun Esperanto-subtekstoj. Atendas vin diversaj specoj de filmoj – fabeloj, dokumentaj filmoj, komedioj, scienc-fikcio. La programo de la filmoprojekciado estos afiŝita surloke.

Filmejon prizorgas: Matthieu Desplantes

Libroservo ☺

Dum la tuta SES ankaŭ ĉi-foje atendos vin riĉa libroservo; en ĝi vi havos unikan eblon aĉeti tre diversajn Esperanto-varojn. Libroj, KD-j, DVD-j, T-ĉemizoj, insignoj, glumarkoj — ĉio tio kontraŭ tre favoraj prezoj. Profitu la eblon riĉigi vian E-kolekton kaj vizitu la libroservon!



Koverta poŝto ☺

Aranĝu vian propran poŝtkeston ĉe SES! Prenu kovrilon, subskribu kaj ornamu ĝin laŭ via plaĉo. Pendigu ĝin sur la afiŝmuron kaj via komunikado kun aliaj uzantoj de SES povas komenciĝi. Vi povas skribi (lasi mesaĝojn) al aliaj partoprenantoj kaj ili povas skribi al vi. Bonega metodo, precipe por komencantoj, kiel komenci komuniki en Esperanto.

P.S.: Bonvolu ne enmeti spamon :-)



Ekskursoj

Duontagaj ekskursoj

Urba piedira ekskurso

(8 EUR, 2018-07-15)

La urbo Liptovský Mikuláš havas tre interesan kaj riĉan historio. Dum ĉi tiu pieda promeno, vi ekscios multajn novajn kaj inspirajn informojn. Akompanos vin rekte en Esperanto profesia ĉiĉeronino, kiu perfekte konas sian urbon kaj respondos ĉiujn viajn demandojn. Nia itinero en la urbocentro preterpasos apud la 12 plej vidindaj monumentoj kaj ni iros rigardi ankaŭ la urban sinagogan, en kiu ĝuste tiam estos ekspozicio pri Esperanto kaj L. L. Zamenhof. La ekskurso finiĝos antaŭ la muzeo de Janko Kráľ per inaŭguro de memoriga monumento, telfero dediĉita al fama loĝanto de la urbo kaj esperantisto, Alojz Lutonský.



Altaj Tatroj

(15 EUR, 2018-07-16)

Altaj Tatroj (slovake Vysoké Tatry) estas la plej alta montaro en Slovakio kaj en Pollando. La Tatra nacia parko troviĝas en la nordokcidenta parto de orienta Slovakio ĉe la ŝtata limo kun Pollando. Samtempe ĝi estas la plej malgranda montarego en la mondo, ĉar ĝi okupas nur 260 km². Ĝi estis formiĝinta de ekstrema altaĵa reliefo kiel rezulto de glacia aktiveco. El la vidpunkto de turismo en Slovakio ĝi estas la plej grava montaro. La setlejo Štrbské Pleso ĉe la lago Štrbské pleso fariĝis grava sporta centro, kie troviĝas ordigitaj spurejoj por skituristoj kaj ski-saltsportistaj pontoj.



La ekskurso estos relative facila, sen tro komplika montgrimpado, kun belega panoramo al apudaj montoj. Tamen ni rekomendas pretigi komfortajn ŝuojn kaj esti preta marŝi ĉ. 5–8 km. La itinero iros ĉirkaŭ la lago Štrbské pleso.

Štrbské pleso estas bela monta lago de glacia origino en la Altaj Tatroj en la setlejo Štrbské Pleso en Slovakio. Štrbské pleso estas glaci-kovrita dum ĉirkaŭ 155 tagoj dum jaro. Estas kelkaj hoteloj konstruitaj ĉirkaŭ la lago kaj turismaj vendejoj apude.

Pribylina – subĉiela muzeo

(12 EUR, 2018-07-17)

Pribylina estas vilaĝo situanta en belega medio ĉe la piedo de Orientaj Tatroj. Tie ni vizitos la Muzeon de liptova vilaĝo, subĉielan muzeon, kie vi malkovros, kiel aspektis vilaĝoj kaj kiel vivis homoj en la regiono dum la lastaj jarcentoj. La konstruaĵoj tie estas aŭtentaj ekzemploj de tradicia arkitekturo, translokigitaj de vilaĝoj, kiuj estis inunditaj en la 1970-aj jaroj pro la konstruaĵo de baraĵo, kiu estigis la lagon Liptovská Mara.

Ni ankaŭ mallonge haltos ĉe la nun forlasita hotelo Esperanto, kie okazis la unua SES en 2007. Survoje reen, ni haltos en la vilaĝo Vavrišovo, en kiu troviĝas rigardoturo, de kie vi povos vidi panoramon de la ĉirkaŭaĵo.



Glacia groto Demänovská

(22 EUR, 2018-07-20)

La glacia groto Demänovská apartenas al vasta sistemo de grotoj en Malaltaj Tatroj, el kiuj du estas alireblaj por la publiko. En ĝi vivas pluraj specioj de vespertoj kaj oni malkovris tie ursajn ostojn. La vizito daŭros 45 minutojn, dum kiuj ni traĵiros plurajn vastajn ĉambrojn kaj mallarĝajn koridorojn. Vi tiam povos ekscii pli pri ekesto de grotoj kaj admiri interesajn geologiajn formaĵojn, inkluzive de la plej unika trajto de ĉi tiu groto: grandaj kaj belaj glaciaj stalaktitoj. Ne forgesu varme vestiĝi: la temperaturo de la groto somere varias inter 0,4 kaj 3 °C! Post la vizito de la groto, ankoraŭ atendos nin mallonga halto ĉe proksima lago kun eblo promeni en la belegra tatra naturo.



Foto: Jojo, Wikimedia Commons

Tuttagaj ekskursoj

Monto Poludnica

(10 EUR, 2018-07-18)



La monto Poludnica (1549 m super marnivelo) troviĝas en Malaltaj Tatroj, kelkajn kilometrojn for de Liptovský Mikuláš. Lokaj esperantistoj kutimas surgrimpigi la monton ĉiuvintre kaj porti al ĝi ŝtonojn de diversaj partoj de la mondo, kiujn ili kolektis dum siaj vojaĝoj. Ĉi tiu ekskurso kontentigos tiujn el vi, kiuj preferas aktivajn feriojn: ni suprengrimpos 900 m dum proksimume 3 horoj. Nepre kunportu bonajn ŝuojn. Dum la grimpadado, vi povos admiri la naturon de la Tatroj kaj de la supro estas belegra vido al Liptovský Mikuláš kaj la valo inter Malaltaj kaj Okcidentaj Tatroj.

Spiša burgo, Levoča kaj Poprad

(29 EUR, 2018-07-18)

La Spiša burgo (slovakie Spišský hrad) estas kastela ruino de la 11-a jarcento, kiu staras sur monto super la vilaĝo Spišské Podhradie. Ĝia ekstera muro ĉirkaŭas areon de 41 426 m², pro tio la kastela komplekso estas unu el la plej grandaj en Eŭropo. La Spiša burgo, kune kun monumentoj de proksimaj urboj, apartenas al la Monda heredaĵo de Unesko ekde 1993.

Survoje reen de la kastelo, ni haltos por mallonga vizito de Levoča, urbo en nordorienta Slovakio. Ekde 2009, ĝi estas en la listo de la monda kultura heredaĵo de Unesko. Levoča kun siaj remparoj kaj urba aranĝo konservis karakteron de mezepoka urbo. Ĝi estas urba monumenta rezervejo kaj danke al multaj monumentoj kaj artaj juveloj, ĝi estas unu el la plej belaj historiaj urboj de Slovakio. La plej fama kaj unika monumento estas la preĝejo de sankta Jakobo kun 11 gotikaj kaj renesancaj flugilaj altaroj, inkluzive de la plej alta ligna gotika altaro en la mondo (18,6 m). La urbo havas grandegan mezepokan placon ĉirkaŭatan de renesancaj domoj, faman renesancan urbodomon, du pliajn



Levoča, Foto: Sebastian Mierzwa, Wikimedia Commons



Spišský hrad (Foto: Pierre Bona, Wikimedia Commons)

valorajn preĝejojn kun baroka interno, klasikismajn konstruaĵojn de la distriktestra domo kaj protestanta preĝejo. La historian centron ĉirkaŭas impona sistemo de muregoj kun longo 2,5 km. Fine, se restos sufiĉe da tempo, ni haltos en la historia centro de la urbo Poprad por mallonga promeno.

Buso al la lago Liptovská Mara / Tatralandia

(10 EUR, 2018-07-18)

Ĉu vi ne volas iri al sporta ekskurso, sed preferas ripozi? Neniu problemo! La buso kondukos vin al plaĝo ĉe la lago Liptovská Mara, kie vi povos sunumi kaj naĝi.

Vi ankaŭ povos iri al la apuda akvoparko Tatralandia, kiu havas multspecajn basenojn, toboganojn, saŭnojn... La enirbileton vi devos pagi mem, la prezaro estas en la [retejo de Tatralandia](#).

Ekskursojn gvidas kaj prizorgas



Ján Vajs



Darinka Hofereková



Pavol Petřík



Aŭspicio

Somera Esperanto-Studado (SES 2018) okazas sub la aŭpicio de:

Martina Lubyová – ministrino pri edukado, scienco, esplorado kaj sporto de la Slovaka respubliko;
Ján Blcháč – urbestro de Liptovský Mikuláš.

Partneroj




**NAJ mesto a obec
SLOVENSKA 2017**



Mapo de la SESejo


Teretaĝo



-  Akceptejo
-  Organizejo
-  Lifto
-  Necesejo
-  Projekto pri Volontula Lingvoinstruado

Mapo de la SESejo

Unua etaĝo



La Mapo

